Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Kunlaboro al “Earth Festa Kanagawa” (la 29an, 30an de nov.)

Tiu ĉi festo estas komuna evento de multaj internaci-rilataj volontulaj organizoj en Gubernio Kanagawa, okazonta en “Earth Plaza” de Gubernio Kanagawa, en Jokohamo.
Tie ni el Jokohamo kaj Esperanto-Societo de Kawasaki kune partoprenos. Ni starigos standon kaj informos pri Esperanto. Ĉi-jare ni intencas prezenti kvizon pri Esperanto.

Zamenhof-Festo (la 13an de dec.)

La ZF de la esperantaj grupoj en gubernio Kanagawa ĉi-jare okazos en urbo Maĉida — urbo ekster la gubernio, sed tute najbara — per la kunlaboro kun Esperanto-Klubo de Maĉida. La ejo estas Serigaya-Kaikan, kaj estos prezentoj pri ĉi-jara UK, IJK ktp.

Ĉi-jara Premio Ossaka al Sibayama Zyun’iti

Premio Ossaka estas japana premio al esperantisto plej aktiva en tiu ĉi kaj antaŭaj jaroj, donita de Japana Esperanto-Instituto, honore al Ossaka Kenzi, kies alinomo estas japana zamenhofo. El Jokohamo, ges-roj Doi Hirokaz kaj Ĉieko ricevis ĝin en 1992. Ĉi-jare, Sibayama Zyun’iti de nia grupo ricevis ĝin, okaze de la 112a Japana Esperanto-Kongreso. (Pri tio legu en n-ro 411).

En la 2a de novembro, ĉe Esperanto-Muzeo, inter 14a kaj 16a horo estis prelego de Sibayama Zyun’iti, japanlingve, pri lia Esperanto-agado ekde 1968, kiam kiel studento li eklernis Esperanton, ĝis la kuranta agado fruktiĝonta post kelkaj monatoj. Ĉeestis 10 personoj inkluzive lin.

(Diplomo sur p.4)

Nekrologo

S-ino Miyakawa Masako (1939-2025)

Nia membro, s-ino Miyakawa Masako forpasis en la lasta oktobro. Ŝi komencis lerni Esperanton en 1988, duonjaron pli malfrue ol ŝia edzo, s-ro Miyakawa Tatsuo (kiu jam forpasis en 2017). En 1989, la geedzoj partoprenis la 84-an Universalan Kongreson en Berlino.

ges-roj Miyakawa ➡

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

Eseo

Serĉante la malgrandan sepan ponton（小七孔橋）viditan en NHK ~ Vojaĝnotoj pri Guiĵuo（貴州）

Toĵo Joŝijuki（藤乘義行）

En aprilo, kiam la malvarmeto ankoraŭ daŭris en Japanio, mi ekvojaĝis al Guiĵuo, Ĉinio, celante la belan malgrandan sepan ponton montritan en programo de NHK. Ĉar ne ekzistas rektaj flugoj de Tokio, mi vojaĝis tra Gŭangĵuo（广州）. Mi alvenis al Gŭangĵuo post ĉirkaŭ 5 horoj per Ĉina Suda Flugkompanio（中国南方航空）kaj kompletigis la enmigradajn procedurojn. Ĉar mi havis 3 horojn antaŭ la transŝoviĝo, mi trankvile manĝis en la malnova restoracio “Kantona Restoracio”（広州酒家）proksime al la flughaveno. La glata haŭto kaj suka enhavo de la wonton-nudeloj（餛飩麵）frue konvinkis min pri la profundo de la ĉina manĝokulturo.

Post plia hejma flugo de Gŭangĵuo, mi alvenis en Guijang（貴陽）je iom post la 10a nokte. La Novotel-hotelo, kie mi restis, havis la plej novan teknologion integrita ĉie; la lifto ne haltus sur la gasto-etaĝo sen ŝlosilkarto. Kiam mi mendis trinkaĵon, afabla liverroboto, kiu aŭtomate cedis vojon al homoj preterpasantaj en la koridoro, anoncis sian alvenon per ĉarma voĉo. Estis nokto surpriza pro la altteknologiaj hotel-kondiĉoj en Ĉinio.

La sekvan tagon mi iris al Dujun(都匀) kaj spertis te-plukadon en organika te-plantejo mastrumata de la Bouei-popolo（布依族）. S-ro Jiang(江), heredanto de nemateria kultura heredaĵo, tuj rostis la tefoliojn, kiujn mi plukis. Kvankam oni diras, ke maturigita teo estas pli bongusta, la freŝa gusto de ĵus plukita teo estis unika. Aŭdinte de s-ro Jiang, ke proksime estas film-loko de la populara dramo “*The Untamed*”（日本放映題「陳情令」）, mi etendis mian vojon kaj tie mi vidis neatenditan scenon: grupo de japanaj virinoj entuziasme fotis per siaj poŝtelefonoj. Demandite, ili diris, ke ili estas grandaj admirantoj de la ĉefaktoroj Wang Yibo（王一博）kaj Xiao Zhan（肖戦）, kaj ili venis por “pilgrimado” dum lernante la ĉinan. La apero de nova tipo de junuloj, malsama al tradiciaj ŝatantoj de Ĉinio, igis min pripensi la estontecon de interŝanĝoj inter Japanio kaj Ĉinio.

La trian tagon mi iris al la malgranda sepa ponta scenarea（小七孔橋景区）. Laŭirante la montan vojon, mi subite ekvidis grandegan vizitocentron kaj miris pri la ordaj vicoj de turbusoj. En la vasta beleco de la verda valo, mi ekridis vidante ke *Kentucky Fried Chicken* havas butikon en la montaro. Estis momento, kiam mi ekvidis la intensecon de turisma disvolviĝo en Ĉinio.

La kvaran tagon mi vizitis Tianlongtunbao（天龍屯堡）, kie loĝas la malnovaj Ĥanoj(老漢族), posteuloj de la Ming-dinastiaj(明王朝) grenplantistaj soldatoj(屯田兵). En la masko-dramo de homoj observantaj Ming-dinastiajn kutimojn, lokaj elementlernejaj infanoj fervore ludis tradician kulturon. La posttagmeza Huangguoshu-akvofalo（黄果樹瀑布）estis pli okupita ol mi antaŭe supozis, tiel ke mi rezignis eniri la kavernon malantaŭ la akvofalo, sed mi estis impresita vidante ĉiun turiston rideti kaj fari memorfotojn kun “Jej!” dum la tuta vojaĝo.

Mi miris, ke en la profundaj montoj de Guiĵuo, poŝtelefonoj ricevas signalon ĉie (eĉ 5G). Mi eksentis la disvolviĝon de Ĉinio kun ĝiaj elvolvitaj aŭtovojoj kaj altrapidaj trajnoj, kaj la plej lastatempa teknologio disvastigita. Nokta Guijang estis vivplena, kun multaj butikoj malfermitaj ĝis la 10a nokte. En Guiĵuo, kie

tradicio kaj moderno bonege kunfandiĝas, mi renkontis junajn japanajn grupojn de dram-adorantoj kaj spertis vojaĝon, kiu sentis novan eblecon de kultura interŝanĝo. Ĝuste ĉar ni vivas en erao, kie ni povas konektiĝi ie ajn per poŝtelefono, la profundiĝanta reciproka kompreno sur individua nivelo – la vojaĝo al Guiĵuo, mi opinias, montris al mi la modernan formon de internacia interŝanĝo.

KAJTO kantis en Muzeo

La nederlanda kantoduopo Kajto vizitis nian Esperanto-Muzeon en la 15a de septembro, babilis kaj ankaŭ prezentis siajn kantojn. Ili poste vizitis Okayama por la Azia-Oceania Kongreso.

eĥo el Aŭstralio

al la traduko en n-ro 411 (oktobro), kies originalo datas je 1918

Dankon pro la sendado de Novaĵoj Tamtamas. Aparte interesis min la artikolo “Kial necesas sendi armeon?” Tio estis skribita antaŭ la apero de nukleaj armiloj. Multaj landoj subskribis akordon cele abolon de nukleaj armiloj (julio 2017 - sed tio ne estas la unua), sed ĉu vere oni ne plu fabrikas tiujn armilojn. Eĉ kelkaj landoj rajtas havi nukleajn armilojn kiel Usono, Francujo, Pakistano, Barato, Rusujo ktp... aliaj ne kiel Irano. Strange, ĉu ne?

Ankaŭ ekzistas akordo cele nek uzi nek produkti personajn minojn; Sed hipokrite landoj, kiuj subskribis tion, produkitigas ilin en alia lando.

Bedaŭrinde la romana diraĵo “Se vi volas pacon, preparu militon” daŭre estas aktuala kvankam nun sufiĉe da voĉoj, sed ne de politikistoj deklaras ke ni ĉesu uzi tiun falsan pretekston. Se vi preparas militon, okazos milito. Se vi volas pacon, preparu pacon.

Korajn salutojn, Franciska Toubale

[noto 1] S-ino Franciska Toubale voĉlegis la artikolon en radio ZZZ. Oni povas aŭskulti tion en https://melburno.org.au/3ZZZradio/2025/10/20/elsendo-de-la-20a-de-oktobro-2025/ .

[noto 2] Ni ricevis alian reeĥon el Piet Glorieux, prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo. Li supozis ke la originala verkinto estis esperantistino sed fakte ne. Al li la tradukinto de la artikolo jam respondis kun danko.

sezonvorto novembra

Okita Kazumi

Paŝi sur la ombron (Kagefumi) 影踏み

Tio ĉi estas speco de kaptiludo, tradicia infana ludo jam de antikvaj tempoj. Ĝi taŭgas por la sezono, kiam la vintro alproksimiĝas kaj la ombroj longiĝas. La ludanto, kiu estas la “kaptanto”, devas paŝi sur la ombron de la fuĝanto kaj ekkrii: “Mi paŝis sur la ombron!”. Tiam tiu, kies ombro estis tuŝita de la kaptanto, fariĝas la nova kaptanto.

Eseo pri Jokohamo

Buslinio N-ro 11 “YAMATE LINER”

veturas sur la monteto de havenurbo Jokohamo

NAMBA Fumiharu

Post kiam vi vizitos nian muzeon “Esperanto-Muzeo Jokohama”, ĉu vi iros al urbocentro Jokohama, precipe al la ĉina kvartalo por bongusta vespermanĝo? Rekomendinda estas buslinio N-ro 11 “*YAMATE LINER*”, kiu veturas inter stacidomoj Hodogaya kaj Sakuragicho, kaj haltas bushaltejon Idogaya apud la samnoma stacidomo, kiu situas proksime de nia Muzeo (nur kelkajn minutojn piede).

Apud la urbocentro Jokohama situas monteto Yamate, kiu havas multajn vidindaĵojn kiel parkon Minato-no-mieru-oka, malnovajn okcidentstilajn domojn, ktp. La buso N-ro 11 supreniras la monteton per kruta deklivo, veturas dekkelkminute sur la monteto, kaj malsupreniras de la monteto. Se vi enbusiĝas de Idogaya, la buso supreniras post malgranda ponto Nakamurabashi, trairas kvietajn loĝkvartalojn, preteriras diversajn vidindaĵojn, kaj post kiam la buso preterpasis la parkon Minato-no-mieru-oka, ĝi subite malsupreniras krutan kaj mallarĝan deklivon al butikstrato Motomachi, kaj tuj vi povas atingi la bushaltejon Chukagai-Iriguchi (enirejo de ĉina kvartalo). Post la ĉina kvartalo, la buso veturas en la centra kvartalo de Jokohamo ĝis la stacidomo Sakuragicho.

La buslinio estas tre utila por ambaŭ turistoj kaj loĝantoj sur la monteto, kaj ankaŭ por vizitantoj de nia Muzeo en Idogaya. Cetere, la vojaĝeto de tiu buslinio estas tre interesa kaj eĉ ekscita. Sur la monteto la stratoj estas tre mallarĝaj kaj kurboplenaj por grandaj busoj, kaj la busoj tre rapide veturas tiujn vojojn trairante malnovajn kaj ekzotikajn kvartalojn. Kelkfoje la buso pasas bonajn lokojn por rigardi belan pejzaĝon de Jokohamo.

La intervalo de buslinio estas 20-30 minutojn dumtage kaj vespere. La kotizo estas 220 jenoj, kiun oni povas pagi ambaŭ per kontantaj moneroj aŭ transportaj saĝkartoj en Japanio (Suica, PASMO, ICOCA ktp.). Oni bezonas ĉirkaŭ 30 minutojn inter Idogaya kaj Chukagai-Iriguchi.

(fotoj laŭ Wikimedia)

Premio Ossaka
小坂賞
S-ro Sibayama Zyun'iti
柴山純一 様
Vi, dum multaj jardekoj, aktive kontribuis en diversaj kampoj inkluzive de eldonado, kongresoj kaj revuoredaktado. Inter 1999 kaj 2012 vi gvidis la japanan Esperanto-movadon, kiel prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, kaj vi faris grandan kontribuon al la eldono de la Esperanto-Japana Vortaro (2006) kaj al la Universala Kongreso (2007, Jokohamo).
Ankaŭ kiel prezidanto de NPO Esperanto Jokohama vi energie okupiĝas pri loka agado.
Alteteksante tiujn meritojn, ni aljuĝas al vi la Premion Ossaka por 2025.
あなたは、出版・大会・雑誌編集など多方面の活動に尽力されてきました。
1999年から2012年にかけては日本エスペラント協会の理事長として、
日本のエスペラント運動を牽引され、2006年「エスペラント日本語辞典」の刊行、2007年横浜 世界エスペラント大会の開催にも、多大な貢献をされました。
また、NPO法人エスペラントよこはまの代表理事として
地域での活動に力を注がれています。
これらの功績を讃え2025年の小坂賞を授与します。
la 20-an de septembro 2025
Kitagawa Ikuko
KITAGAWA Ikuko
Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto
一般財団法人日本エスペラント協会 理事長 北川郁子

Diplomo (Legu pri tio sur p.1)